

20A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
ANTVERPENO
3 - 11 AŬG 1928

Hotel Belle Vue
Waulsort s/Meuse
ĝis la 18a

18-8-28

Amiko kara,

Ni lacigis nian cerbon serĉante kie vi estis en Bruselo. Mi gardis lokon apud mi dum la komuna tagmanĝo kie ni estis multaj + multaj. Mi interrompis mian tagmanĝon ĉiam rigardante ĉu vi venis. Poste mi iris + reiris tiom da fojoj piede ĝis la tramhaltejo kie entramiĝis la kongresanoj por la posttagmeza ekskurso ... sed neniam Fousek. Ĉu de nove vi trovis alian Kapitolon kiu allogis vin pli ol la tago komuna en Bruselo? Ĉu vi perdiĝis? ĉu vi iris rekte al la maro? ĉu Ges^{roj} Sergeant estas plu nenio al vi. Mistero! mistero! Mi volis adiaŭi vin + ne povis. Eble vi klarigos unu tagon.

Kaj jen por kelkaj jaroj ... + poste oni estos tre maljuna + ne havos la saman entuziasmon.

Kio ajn estas mi multe ĝuis tiun-ĉi Kongreson + ne facile forgesos ĝin + dankas vin pri via apudesteco + via afableco.

Tiu-ĉi loko, Waulsort, estas tre bela + vidinda + tute sentema, bela rivero, altaj rokoj, montoj, arboj + nia hotelo tute bela. Ni forlasos ĝin la 18^{an} + estos hejme (aŭtomobile) la 20^{an} vesp.

Kaj vi? kie vi estas? kiam vi atingos Přelouč? eble via menso + koro estos tute plenaj de kongresaj impresoj + eble ili daŭros ... ĝis la fino, kiel vi diris.

Eble tiu vojaĝo via donos al vi la deziron vidi aliajn landojn + aliajn kutimojn + eble vi iros Parizon iam + Boulognon ankaŭ, ĉu ne?

Ho! kiel la vidaĵo antaŭ mi, dum mi al vi skribas estas belega. Ĝi revigas! Estas loko, pri kiu, se mi estus poeto mi skribos¹ belajn poeziojn. Ĝi revigas al la beleco, al la boneco, al ĉio kio estas bela + inda sur la tero! Bedaŭrinde vi neniam vidos ĝin!

Estas teruraj rememoraĵoj pri la mortigoj en Aug. 1914, monumentoj ekz: je l'nomoj de 13 malfeliĉaj senkulpitoj mortigitaj de la Germanoj dum ilia restado sanga ĉi-tie + en Dinant !!!

Amiko, mi prenas viajn manojn en samidealama Kongresa maniero + esperas ke vi fartas bone ... + ke vi estos feliĉa trovante la bonan direkton.

Ĉiam la sama idealama

Alice Sergeant

¹ ĉu "skribus" ?